

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Vol. 11, No. 1

51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio.

DONALD BROADRIBB, Editor

Published by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ, and founded in 1953. The Esperanto League is officially affiliated with the Universala Esperanto-Asocio (in consultative relations with UNESCO), and is a participating organization in the People-to-People Program (John F. Kennedy, Honorary Chairman; Dwight D. Eisenhower, Chairman, Board of Trustees).

Subscription Rates: \$3.00 regular, \$2.75 gift subscription (three for \$5.00). **Membership Rates:** \$5.00, regular; \$10.00, supporting member; \$20.00, patron member; \$100, life member; \$7.00, man and wife. Checks and money orders should be payable to the Esperanto League for North America. **Send all payments and correspondence to the Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.**

Officers of the Esperanto League for North America, Inc.: President, David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President, Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer, John Futran, 601 West 164th St., New York 32, N. Y. **Executive Board:** Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland; Dorothy Holland, 1701 Rockwood Trail, Fayetteville, Arkansas; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; James Lieberman, 24 Clafin Rd., Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California; Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico; Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Information Section of the League: 7008 Millwood Road, Bethesda 14, Maryland. **Audio-Visual Aids Department:** 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. **Book Service:** Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin. **Administration of the Review:** Francis Helmuth, P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Material for the next issues of the **Review** must reach the editor by the 1st of February and the 1st of April.

Manuskriptojn, librojn recenzotajn, kc. sendu rekte al la redaktoro Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio. Urĝajn komunikojn sendu per aerogramo.

NIA KOVRILO

Panoramo pri la Esperanto-Revuo.

David Richardson

DATREVENO DE NIA REVUO

La unua numero de "Nord-Amerika Esperanto-Revuo" aperis en 1953, redaktita de la konata Esperantisto kaj verkisto, James D. Sayers. Efektive, jam estis aperinta en 1952 serio de kvar bultenoj—la lastaj tri estis presitaj—kiuj portis la simplan nomon "informilo". Tiuj paĝoj, nun iom flavigantaj, estis la voĉo de la reorganiza movado, kiu kulminis en la fondiĝo de la Esperanto-Ligo en la somero de tiu jaro.

Sed nia gazeto vere naskiĝis en januaro, 1953. Jam de la komenco la ofistoj de la Ligo konstatis la bezonon por regule aperanta, digna organo por ke la afero prosperu kaj ne mortu naskiĝanta. Sed en tiu periodo, kun ĝiaj financaj kaj aliaj malfacilaĵoj, oni ne povis antaŭvidi kio fakte okazos, kaj por certigi, ke la membroj ricevu regule taŭgan gazeton, oni aranĝis en tiu unua jaro por livero al ĉiuj membroj ankaŭ de la bonega organo de Brita Esperantista Asocio.

La dua numero de la Revuo aperis en Aprilo, kiam oni okupiĝis pri planoj por la unua Kongreso en Madison, Wis. Tiam, subite, S-ro Sayers devis demeti la redaktadon pro malboniĝanta sano. Ni tiam ne povis scii, ke tio estas nur la unua el tri fojoj dum sia unua jardeko, kiam la Revuo perdis redaktoron pro grava malsano.

Dume la kostoj por presado montriĝis pli kaj pli altaj, kaj la Liga kaso montriĝis pli kaj pli nesufiĉa. En sekreto oni komencis scivoli, ĉu vere la novnaskita Ligo povos travivi.

Sed feliĉe pli kaj pli da nordamerikaj Esperantistoj aliĝis; entuziasmo por la Ligo estis nekontestbla; pluraj bonvoluloj donacis monon por helpi pagi la ŝuldojn. Kaj kiel novan redaktoron la Ligo akceptis—min.

Por batali la ĉiam altigantajn preskostojn ni decidis presi ofsete, kaj mem komposti la tekstojn. En Tacoma, Wash., mi konatiĝis kun juna

presisto kiu simpatiis kun Esperanto. Li promesis presi la gazeton je favora prezo, kaj pruntis al mi malgrandan presilon per kiu provpresi la tekstojn. De la Societo Esperantista de Seattle mi pruntis stoketon da preslitteroj.

En la aŭtejo de mia luita hejmo en Tacoma, mi instalas la ekiparon, kaj komencis komposti mane—kiel oni faris antaŭ cent jaroj. Post dek aŭ dek-du linioj necesis presi unu ekzempleron de tiu fragmento, poste distribui la preslitterojn kaj ekkomposti la sekvantajn liniojn. Poste, ĉiuj fragmentoj estis kungluitaj en la dezirata aranĝo kaj la tuto liverita al la presisto por fotografiĝo kaj presado.

Fine elvenis la unua numero en tiu stilo, kun raporto pri la kongreso en Madison.

En januaro, 1954, la Revuo eka-peris en pli granda formato. Ne povante mem komposti tiom da materialo mi estis feliĉa akcepti la helpon de Ferd Carlson, kiu same ekuzis sian liberan tempon por mane komposti tekstojn por nia gazeto. Poste, kiam nia financa situacio iom pliboniĝis, ni komencis mendi parton de la tekstoj ĉe komerca linotipejo.

Mi opinias, ke la Ligo rajtas fieri pri la fakto, ke de tiu unua numero de 1954 ĝis la hodiaŭa tago, nia Revuo eliris regule ĉiun duan monaton, ses numeroj en ĉiu jaro, sen escepto.

Komence de 1955, nia situacio estis multe pli firma, kaj ni decidis fari alian paŝon antaŭen kaj mem presi la tutan gazeton. Mia presista amiko havis kroman presilon, kiun li volis vendi: ĝuste tiel grandan, kiel ni bezonis. Ferd elpoŝigis sian propran monon kaj aĉetis ĝin, kaj kun helpo de Samideano B. Lerman, el Seattle, ni transportis ĝin al la domo de Ferd, kies kelo tuj transformiĝis en presejon. Ni ankaŭ aĉetis novan stokon da preslitteroj, sufiĉaj por povi komposti je unu fojo ĉirkaŭ ses paĝojn.

La intenco estis, ke mi kompostu en la kelo de mia nova domo—kiu ankaŭ fariĝis presejo, aŭ almenaŭ kompostejo—la paĝojn, kaj portu ilin

INVITON AL PITSBURGO

amike sendas al vi la Esperanto-grupo, por la **Kongreso 1963 de ELNA**. Se vi partoprenis la pasint-jaran kongreson, vi jam scias kiel ekscita kaj anticipinda estos tiu evento. Se vi ankoraŭ ne partoprenis kongreson, ĉi tiu oportuno estas vere kaptenda. Uzadi Esperanton aktive kaj praktike, renkonti amikojn nur perpoŝte konitajn, lerni kaj aŭdigi viajn opiniojn pri la nord-amerika movado, tion vi povos en la koro de unu el la plej famaj urboj en la lando. La datoj de la kongreso ankoraŭ ne estas difinitaj, kredeble en julio. Sed jam nun planu pasigi vian ferion kun la pitsburganoj.

per aŭto al Ferd por la presado. Ĉio iris glate, ĝis Ferd, ne tute al kutimiĝinte al la nova maŝino—multe pli granda ol tiuj, pri kiuj li jam havis spertojn—lasis sian manon tie, kie oni nepre ne lasu ĝin, kaj subite li havis tri fingrojn en la formo de patkukoj. Tiu doloriga sperto tuj ekspresistigis lin, almenaŭ provizore, kaj S-ro Lerman kaj mi iom amator-ecce finis la presadon de tiu numero.

Iom post iom Ferd regajnis la uzon de sia mano kaj fakte fariĝis tre sperta presisto. Mi daŭrigis redakti kaj komposti la gazeton ĝis unu vespero en septembro, 1955, kiam mi enlitiĝis kun "malvarmumo" kaj trovis, la sekvintan matenon, ke mi ne povas plu movi unu kruron. En tiu lasta somero antaŭ la ĝeneraligo de Salk-injekcioj, mi enhospitaliĝis pro polio-mjelito, kaj ne plene rehavis mian sanon ĝis post proksimume tri jaroj.

Sekve de tio Ferd fariĝis redaktoro kaj presisto, kaj daŭris en tiuj laboroj ĝis 1960. Dum tiuj jaroj, laŭ mia kalkulo, li donis al la afero tute sen salajro po ĉirkaŭ 40 horojn semajne.

Post oktobro, 1960, Ferd devis demeti la laboron pro kruela malsano, kiu de tiam pli kaj pli senfortiĝis lin

kaj du jarojn poste postulis lian vivon.

De novembro, 1960, ni havas kiel redaktoron Samideanon Broadribb, kaj kiel presiston Samideanon Rudiger Eichholz ĉe Esperanto-Press, en Kanado.

Unu jaron post kiam li akceptis la redaktoran postenon, S-ro Broadribb havis oportunon foriri al Aŭstralio por daŭrigi siajn studadojn, kaj samtempe instrui fremdajn lingvojn en tiea lernejo. La Estraro multe bedaŭris la ŝajnan perdon de la nova Revu-ĉefo, ĝis oni ekhavis iom aŭdacan penson. En la moderna mondo, kiu fariĝas "pli kaj pli malgranda" kiel ni Esperantistoj tiel ofte insistas, la distancoj estas mezureblaj per horoj kaj tagoj anstataŭ per semajnoj kaj monatoj. En lando tiel vasta, kiel Usono, la redaktoro rilatas kun la Esperantistoj preskaŭ ekskluzive per la poŝto, kaj dum letero iras aere de Nov-Jorko al Los Angeles en 2-3 tagoj, letero el Aŭstralio iras Usonon en 3-4 tagoj: diferenco de nur unu tago.

Tial oni decidis ne rezigni pri la lerta redaktorado de S-ano Broadribb, kaj li, sekve, baldaŭ kompletigos sian unuan jaron tie en "Sublando" sen rompo en la flua prizorgado de nia organo.

Lastan jaron ni ankaŭ decidis strebi por pligrandigi kaj plibonigi, teknike, la Revuon. La diversaj ŝanĝoj en la formato kaj enhavo de la gazeto renkontis preskaŭ universalan aprobon. La nova gazeto, kompreneble, kostas al ni pli ol antaŭe, sed mi opinias, ke ĝi valoras la koston.

Denove kaj denove, la spertoj de la Esperanto-movadoj en Usono kaj alilande montras, ke kiam ajn la movado floras kaj bonsanas, gravan rolon ludas plaĉa, akurate aperanta kaj bone redaktata gazeto. Pli ol iam, mi estas konvinkita, ke ni nepre bezonas ĉiam subteni la gazeton kaj ke ĝi estu kiel eble plej granda kaj bona.

Do, "feliĉan naskiĝtagon" al nia Revuo; en la tagoj venontaj, ĝi kresku kaj prosperu, kaj kun ĝi nia Ligo, kaj Esperanto.

DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE LA ESPERANTISMO

Teksto adoptita de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, Boulogne sur Mer, 1905.

Car pri la esenco de la esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la Lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne en-trudante sin en la internan vivon de popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn," donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon komprenigadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo estos lia afero pure **privata**, por kiu la esperantismo ne respondas.

2. Car en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo **arta**, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, **faritaj** en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciente, ke teoria disputado kondukos al nescio, kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo **Esperanto** kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Car la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu

fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas "nenies propraĵo," nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaĵoj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.


4. Esperanto havas nenium personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute **privatan** kaj por neniu devigan. La sola, unufojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj, fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto" en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj "tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto." Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la "Fundamento de Esperanto," ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate, imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

NOVJARA LETERO

AL NIAJ

LEGANTOJ



51 Primrose St.
Moonee Ponds
Victoria
Aŭstralio.

Karaj amikoj,

Mi volis sendi al vi ĉiuj kristnaskan leteron, sed ĉar nia Revuo ne aperas en tiu monato, mi devis kontentiĝi per novjaraj salutoj. Bonvolu ilin akcepti, de mi mem kaj de mia edzino Rozo.

Mi nun komencas mian trian jaron kiel via redaktoro. Ni ankaŭ komencas, ĉimonate, nian duan jaron en la antipoda lando Aŭstralio. Ambaŭ datrevenoj donas al ni varman senton.

La 22an de januaro, 1962, ni flugis el Usono per la aerlinio Qantas (kaj ne, kiel flustras ĵuj kalumniantoj, en

Pelikano

la poŝo de saltanta kangaruo—cetero, tiu poŝo estas kutime okupata) kaj surteriĝis en Sidneo. Post tiu, la plej granda aŭstralia urbo, ni venis al Melburno, kie ni nun loĝas kaj laboras. Nin tre varme bonvenigis kaj hejmsentigis la Esperanto-klubo ĉi tie, kiu helpis nin trovi loĝlokon kaj ankaŭ tuj kaptis min por instrui kurson en ilia propra Esperantodomo.

Ni lernis multon pro nia vojaĝo al la “lando kie oni marŝas kun la kapoj malsupren.” Ni lernis ke Esperanto kunligas eĉ kie oni la anglan lingvon parolas; ni lernis ke la moderna tekniko tiel faciligas komunikadon, ke estas egale facile redakti gazeton 9,000 mejlojn for kiel 200 mejlojn for; ni lernis ke homoj estas



Kangaruo . . .

kaj nia redaktoro



Emuo

egale simpatiaj, negrave kie ili estas. Ni eĉ lernis manieron plibonigi la aspekton de nia Revuo, per malpli granda kosto, utiligante la servojn de tre helpema linotipisto ĉi tie.

Mia edzino kaj mi ambaŭ partoprenas la universitatan vivon: ŝi kiel studento, mi kiel samtempe instruanto kaj doktorigonto. La Esperanto-klubo, la kvakera grupo, kaj la redaktado foruzas multan tempon; tial, mi esperas ke vi pardonos se ne ĉiam vi ricevas respondon al viaj komunikoj kaj leteroj, aŭ se anticipinte leteron vi ricevas nur noteton. Ĉiu skribaĵo estas bonvena, kaj zorge atentata, eĉ se prese vi vane serĉas evidentan signon pri ĝia influo.

Melburno estas granda urbo, sur la sudorienta marbordo de la kontinento. Cetere, ekzistas nur ses urboj sur la tuta kontinento, laŭ usona kalkulado; la aliaj estas nur vilaĝoj. Sed tiuj urboj estas grandaj: Melburno havas ĉirkaŭ 1,700,000 loĝantojn. Eble vin konfuzos tio, se vi serĉos en via atlaso. Teknike parolante, tio estas por la metropolita Melburno. Kion ĉi tie oni nomas "La Urbo Melburno" estas tio, kion oni en Usono emas nomi "downtown," t.e. la centra komerca kvartalo; kaj la multaj kvartaloj kiuj kune formas unu urbon laŭ usona kutimo, ĉi tie havas apartajn nomojn kaj administraciojn (ne tre malsimile al la borough-sistemo de Novjorko). Do mi loĝas en la kvartalo Essendon, subdistrikto Moonee

Ponds, de la metropolita urbo Melburno. Kaj por la poŝto tute sufiĉas Moonee Ponds. Victoria estas la ŝtato.

Ne, niaj amikoj, kies bildojn vi vidas diversloke sur ĉi tiuj paĝoj, ne promenadas sur la stratoj libere. Efektive, ni devis iri al la bestprotektejo ĉe Healesville (ĉ. 30 mejlojn for) por ilin trovi. Sed ekzotikaj birdoj, kies ekziston ni eĉ ne scias en Usono, ĉirkaŭflugas kaj strange blekadas kie ajn ni estas.

Mi povus multe longigi la leteron, rakontante niajn spertojn ĉi tie. Tamen, spacmanko severe malpermesis al mi tion. Anstataŭe, mi nur sendas al vi bondezirojn por la nova jaro, kaj antaŭdankojn por la leteroj kaj artikolkontribuoj kiujn vi sendos dum la tempo venonta.

Via,

Donald Broadbent

CHU VI SHATAS NIAN REVUON?

Ĝi aperas ĉiam kun grava financa defcito. Se vi helpas per donaco al la eldonkaso, la vivo de la Revuo estos pli sekurigata.



NOVAJ LIBROJ

Entute tro malofte aperas verkoj en Esperanto de nordamerikaj samid-canoj. Kiam tio okazas, do, estas kaŭzo por speciala fiero kaj jubilo. Permesu al mi nun iom jubili pri la jus aperinta **La Profeto**, esperantigita de nia ELNA - anino Roan Orloff Stone en vere brila maniero.

Per enkonduko verkita de D-ro James Lieberman, ankaŭ usonano kaj estrarano de ELNA, ni lernas la esencajn faktojn pri la verkinto. Kahlil Gibran estis libano, kiu migris Usonon en 1894. Li verkis plurajn librojn anglalingvajn, sed la plej fama estas **La Profeto**. La eksterordinare sentema Gibran pritraktis la eternajn demandojn, kiuj frontas ĉiujn homojn, ekde la komenco de la homa raso. Sed li ne estis inter tiuj pseŭdo-mistikuloj, kiuj sondas la misterprofundojn kaj ofertas "respondojn" tiel vualitajn per mistikajoj, ke ili estas kompreneblaj nur al la aŭtoro mem. Gibran fakte prilumas la demandojn mem en maniero, kiu subtenas la serĉantan homon en ties propra serĉado al la vero.

La Profeto estas esence prozforma poezio. Mi ĝojas raporti, ke la esperanta traduko estas same rafinita kaj polurita literatura gemo, kiel la anglalingva verko. S-ino Stone sukcesis ĉiam trovi ĝuste la precizan vorton aŭ esprimon por redoni ne nur la sencon sed ankaŭ la arton de la originalo. Mi gratulas, kaj kore rekomendas al ĉiuj legantoj ĉi tiun novan pruvon pri la beletra kapablo de nia lingvo.

La Profeto aperas kiel volumo 13 de la Beletraj Kajeroj, eldonitaj de Stafeto. Samtempe kun ĝi aperis tri aliaj kajeroj, ĉiuj kun aparta intereso por esperantistoj. N-ro 10 en la serio estas reldono de la plena **Proverbaro Esperanta** de D-ro Zamenhof. Ĉi tiu eldono de verko delonge malaperinta el la librejoj inkluzivas tre detalan indkson por kiu trovi serĉatajn proverbojn laŭteme, kaj enkondukon de Gaston Waringhien, krom

antaŭparoloj de Marko Zamenhof (la patro de L.L.) kaj de D-ro Zamenhof mem.

Kajero n-ro 11 estas kolekto de verkistaj petolajoj en la formo de parodioj kaj "pasticĉoj" kiuj rilatas en ofte tre pika maniero al la plej altaj verkistaj lumoj en Esperantujo. Neniu eminentulo estas sekura de la bonhumoraj (kaj kelkfoje embarase trafaj) atakoj perlumaj de Henri Beaupierre en lia libro **Specimene**.

La libron ornamas tri koloraj ilustraĵoj kaj unu nigra-blanka, sed speciale la lerto de la verkinto. La humoro plejparte estas subtila kaj legantoj devas ne nur regi la lingvon sed scii iometon pri la esperantista scenejo ĝenerale.

Kiel la lastan sed neniel malpli gravan eldonon en la kvar-voluma serio (kiu, cetere, festas dek-jaran agadon de Stafeto) ni havas interlingvistikan verkon, **Planlingvaj Problemoj** de William Gilbert. Gilbert estis dum longaj jaroj adepto de Occidental. Nun li publikigis tre erudician komparon inter Esperanto, unuflanke, kaj aliflanke ĉiuj el la nuntempaj formoj de t.n. "naturalismaj" planlingvoj. La komparo ĉiel favoras Esperanton kaj donas eble la plej kompletan kolekton ĝis nun de argumentoj por la supereco de Esperanto el la lingvistika vidpunkto, kaj ĉio estas en nepasia, dokumentita kaj scienca maniero.

Aliaj novaj libroj

La Esenco de la Kvakerismo, Gerald K. Hibbert, trad. Marek Wajsbłum, eld. Kvakera Esperantista Societo, broŝ. 40 pp.

Neelmezurebla ni Laŭdegas Vin, Preĝoj por ĉiuj Kristanoj, Thomas-eldonejo. 34-paga poŝforma, dura bindo.

Bosnice Fabletoj, Ferdo Skrljac, poemrakontoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun ilustraĵoj. Tradukitaj el la kroata. Broŝ. 48 pp.

David Richardson

Ivo Lapenna

INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Alvoko de C.E.D. al geinstruistoj.

En la nuna stadio de la klopodoj vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj estas absolute necese havi kiel eble plej fidindajn kaj plej kompletajn informojn pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata nuntempe, nome en la lerneja jaro 1962-1963.

CED do afable petas ĉiujn geinstruistojn, kiuj instruas Esperanton en lernejoj de kiu ajn nivelo, en la lerneja jaro 1962-63, respondi al la suba demandaro kaj sendi sian re-

spondon al la kunlaboranto de CED por lernejoj statistikoj S-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, C. Durham, Britujo. CED presigis poŝtkarton kun la samaj demandoj por faciligi kaj simpligi ĝis maksimumo la respondojn. Ĉiu instruisto povas, do, aŭ respondi laŭ la suba demandaro per aparta letero aŭ poŝtkarto, aŭ peti de s-ro Kennedy la demandaron presitan sur pretan poŝtkarton.

Tuja sendo de la petitaj informoj multe faciligos la taskon de s-ro Kennedy, sed bv. noti, ke la respondoj devas atingi s-ron Kennedy nepre antaŭ la 1-a de aprilo 1963.

CED anticipe dankas al ĉiuj geinstruistoj, kiuj helpas ĝin en tiu ĉi grava enketo per tuja respondo.

DEMANDARO

Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata en la lerneja jaro 1962/1963.

1. Lando.....
2. Urbo.....
3. Nomo de la lernejo.....
4. Nivelo E (elementa)
- M (meza).....
- A (alta, ekz. universitato)
5. Tipo m (miksita).....
- a (nur knaboj)
- b (nur knabinoj)
6. Kiom da lernantoj de Esperanto: knaboj?..... knabinoj?.....
7. Kondiĉoj de instruado:
 O (oficiala) aŭ NO (neoficiala).....
 D (deviga) aŭ ND (nedeviga)
- K (en la kadro de la lerneja programo) aŭ EK (ekster ĝi).....
8. Dum kiom da jaroj oni jam instruis Esperanton en la lernejo?.....
9. Antaŭnomo kaj nomo de la instruisto.....
10. Adreso.....

(Bonvolu: plenigi la demandaron uzante la indikitajn mallongigojn kaj presliterojn, afranki kaj resendi antaŭ la 1-a de aprilo 1963 al S-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.)

KANDIDATIGA KOMITATO

por ĉi tiu jaro nun ekzistas. Komitatestro estas William R. Harmon, 315 San Mateo Drive, San Mateo, California. La komitato deziras, ke oni sendu la nomojn de proponataj kandidatoj por la sekvantaj postenoj:

Prezidanto de ELNA
Vicprezidanto de ELNA
Tri estraranoj

Tiuj postenoj vakos en julio. Ilin nun okupas David Richardson, Charles Peterson, Catherine Schulze, Martha Walker, kaj Armin Doneis.

Se vi deziras proponi nomojn, bonvolu skribi al la komitatestro, William Harmon.

DEZIRAS KORESPONDI

Anglujo:

Joseph Hegedus, 21 Highbury, Newcastle 2. (Belajn kolorajn bildkartojn el Usono, kun kelk-liniaj mesaĝoj.)

Hungarujo:

Ildiko Tarjan, Varosmajor utca 42, 11-1 ajto, Budapeŝt XII. (30 jara fraŭlino, membro de la Int. Ligo de esperantistaj foto-kino-amatoroj; verkisto de jaz- kaj moderndanc - muziko; deziras interŝanĝi kolorajn bildkartojn pri urboj, kostumoj; kolektas gazetojn pri kino kaj ĉarmulinoj.)

Indispensable for the
Esperanto student

SUPPLEMENT TO THE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY OF MILLIDGE

by

Donald Broadribb
(assisted by Paul Nace and
C. D. Capp)

\$.30 from the ELNA Esperanto Book
Service, Middleton, Wisc.

UEA

Universala Esperanto Asocio, estas la internacia grupo de kiu nia ELNA estas landasocio. Individuaj personoj povas ankaŭ membriĝi:

membro ricevanta la monatan gazeton **Esperanto** kaj ankaŭ la **Jarlibron** pagas \$4.50 jare

membro ricevanta nur la **Jarlibron** pagas \$2.25 jare

persono malpli ol 21 jara pagas nur \$2.25 kaj \$1.13 por tiuj du kategorioj de membreco.

abono al la gazeto **Esperanto**, sen membreco, kostas \$3.50.

Sendu vian pagon, aŭ demandojn, al Donald E. Parrish, 328 West 46 St., Los Angeles 37, California.

(pagita reklamo)

VIA UNIKA ŜANCO

NUN estas via unika ŝanco dumvive membriĝi en la Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista (INFE).

Por sumeto vi **dumvive** membriĝos, ricevos membro-karton kaj dumvive ricevados nian riĉe ilustritan revuon en Esperanto, "Naturista Vivo."

Petu senpagajn ilustritajn prospekton kaj specimenon de N.V. de: INFE, 1801 Page, San Francisco 17, California.

MANUAL FOR ESPERANTO CLUBS

Ne forgesu ĉi tiun tre utilan libron eldonitan de ELNA antaŭ kelkaj monatoj. Jam komencis aperi suplementoj, kiujn ricevas sen ekstra pago aĉetintoj de la libro. Aldonendas al la listo de enhavo (presita en la septembra numero de la Revuo): "Learn a Foreign Language—the new way" kaj "Esperanto Experiment in Finnish Schools." Se vi ne havas la libron, ĝin vendas por \$2 la sekretario de ELNA.

LABORPLANO DE UEA

En la pasinta numero ni presigis la tekston de la Laborplano de UEA, aŭ, pli ĝuste, la tri sekciojn kiuj speciale rilatas al la naciaj asocioj kaj kies plenumadon rekomendis la kongreso de ELNA. Post la kompostado de tiu numero, aperis la reviziita teksto de la Laborplano, laŭ ŝanĝoj faritaj en la UK. Cisube ni indikas la modifojn en la reprisitaj sekcioj:

12. **Landaj Asocioj:** en la unua frazo, antaŭ "programo" enmetu la vorton "konkretan"; en punkto (k) antaŭ la vorto "nur" enmetu la vortojn "laŭ ebleco"; kaj la alfabetan numeradon oni ŝanĝu al (a), (b), (c), (ĉ), (d), (e), (f), (g), (ĝ), (k). Oni ankaŭ aldonu novajn punktojn: (j) krei i.a. instancojn por lingvoscienco, kiuj prizorgu la plialtigon de la lingvonivelo de la landa esperantistaro, la plibonigon de la instruado, de la lerno-libroj, la trastudon de lingvaj problemoj rilatantaj, unuflanke, al malutilaj influoj de la naciaj lingvoj, kaj, aliflanke, al la neceso krei internacilingvajn esprimojn por specifaj nacilingvaj vortoj kaj esprimoj.

25. **Landaj Asocioj:** en punkto (e) post "institucioj," aldonu "helpante al ili korespondi per Esperanto kun parencaj organizaĵoj en eksterlando"; kaj la alfabetan numeradon oni ŝanĝu kiel supre.



NIAJ ESTRARANOJ — II

David Richardson, prezidanto de E.L.N.A. Naskita en 1926 en Seattle, Washington. Cirkaŭ 1937 D-ro Badgley, seatla dentisto, donis al lia patro ŝlosilon pri Esperanto, kaj li transdonis ĝin al David, tiel interesante lin pri la lingvo. Post la gimnazio, li studadis intensan kurson pri la rusa lingvo, kaj poste eniris la armeon . . . kiel infanteriano. Dum la militservo, en la germana urbo Tauberbischofsheim, li aŭdis ke en proksima vilaĝeto loĝas esperantisto, kaj tiun li kaŝe renkontis—la unuan eksterlandan esperantiston renkontitan. Post la milito, kiel radio-anoncisto en la alianca radio-reto, li renkontis James D. Sayers. Reveninte, al Usono, li studis dum 3 jaroj pli en la Universitato de Washington, diplomigis en la fako de fororientaj aferoj, kaj celis registaran karieron. Trijara civila posteno kun la usona armeo ebligis al li kaj lia edzino loĝi en Eŭropo, kaj ĉeesti la UK 1951 en Munkeno. La unua infano, Sila, naskiĝis en Frankfurto-sur-Main. Tri monatojn poste ili revenis al Usono, kaj David komencis labori kiel radio-anoncisto, poste televid - inĝeniero. Polio-malsanatako en 1955 ombrigis lian vivon, sed resaniĝo venis. 2a infano, Blair, naskiĝis en 1955. En 1960 ili transiris al la belaj Insuloj San Juan inter Usono kaj Kanado, kie David plulaboras kiel televidisto, kaj estas bone konata en la esperantista mondo.

PORJUNULA AGADO

Katolika: Dum la 29a kongreso de I.K.U.E., la pasintan aŭguston, 40 junuloj diskutis kaj fondis novan sendependan katolikan grupon nomatan "La Alta Flugo." La jam aperintan gazeton "Birdo" oni adoptis kiel organon. Prezidanto estas Klaus Perko, en Aŭstrujo; aliaj funkciuloj estas H. Weltens (Nederlando), S. Maul (Germanujo), A. de Salvo (Italujo), D. Walenzyk (Polujo). La kotizo estas \$1.20, kaj la adreso: La Alta Flugo, Wolfstraat 4, Maastricht, Nederlando.

UEA: Cirkulero dissidentas fine de novembro atentigas, ke UEA nomis la jaron 1963 "Junulara Jaro." Celante plifortigi la esperantan movadon, oni volas plidivastigi la lingvon inter junuloj. (Tiun terminon nek la katolika nek la UEA komunikoj difinis, supozeble temas pri personoj ĝis la fino de universitataj studoj.) Konstatante ke jam ekzistas diversaj porjunulaj agadoj, ekz. la junularsekcio de UEA, kaj la kampanjo por instrui Esperanton en lernejoj, necesas tamen agnoski, ke la lingvo ankoraŭ ne kontentige allogis la junularon. La programo por la "Junulara Jaro" estas duflanka: unue, plifirmigi la ekziston kaj agadon de porjunulaj esperantistaj grupoj, kaj doni pli da atento al junuloj en la movado; due, pliintensigi la propagandadon en lernejoj, porjunulaj gazetoj, kc.

Ni atentigas al la legantoj pri la "Junularo Esperantista de Nordameriko" kies adreson oni trovas sur la kovrilo en la klublisto, kaj pri la favorkotizoj de UEA por personoj malpli ol 21 jaraĵ. (Duono de la prezo pagenda de ordinaraĵ personoj.)

Specialan komenton deziras fari via redaktoro: estas dezirinde ke Esperanto iĝu familia lingvo, anstataŭ klubla lingvo. Tre ofte, eĉ preskaŭ kutime, oni trovas ke edzo aŭ edzino parolas aŭ lernas Esperanton, sed ne ambaŭ faras tion. Por tia persono Esperanto malfacile iĝas pli ol "hobby". Grandan plifirmigon ĉiurilate ricevus la lingvon, se ĝin uzus multe pli da "denaskaj esperantistoj," t.e. se Esperanto estus pli kutime

uzata kiel familia lingvo, kiun kernus infanoj de la gepatroj. Eble do ni povus aldoni al la programo de la "Junulara Jaro" ĉi tion: kaj vi kaj via edz(in)o lernu flue paroli Esperanton, kaj lernigu ĝin al viaj infanoj.

JARLIBRO 1962 DE UEA

En decembro 1962 oni ricevis la jarlibron, preskaŭ unu jaron malfrue. Krom la demando kiun nepre oni faros al si, "kiam do aperos la dua parto?" oni rajtas fari al si alian: "kial libro tiel malfrue aperinta ne profitis la okazon por aktualigi la enhavon?" Oni legas en ĝi informojn pri 1961, kaj (krom la delegita listo laŭdire akuratigita ĝis marto) grandparte la adrecoj restas presitaj kiel en 1961, kaj eĉ pli frue!

La 488 paĝa enhavo estas la kutima: listoj de funkciuloj de UEA, kun adresoj; adresoj de la landaj kaj fakaj asocioj, kun mallongaj priskriboj pri tiuj lastaj; listoj pri magnetofonbendoj kaj pri libroj (pli komplete ĉijare ol antaŭe), pri la gazeto; 253 paĝoj da delegitlistoj; kaj listo pri libroj vendataj de la libroservo (entute 746 verkoj, el kiuj 603 en Esperanto). Kaj dismetitaj en la libro estas 95 paĝoj da reklamoj, el kiuj 36 de esperantistaj entreprenoj (granda parto estas de UEA mem). Do, malgranda informlibro pri la esperanta movado, tute ne "ne malhavebla" kiel diras iuj troentuziasmuloj, sed kun valoroj.

BOOKS ABOUT ESPERANTO BOOKS IN ESPERANTO

For textbooks, dictionaries, readers, as well as for books currently available in Esperanto, ask for a catalog from the

Esperanto League Book Service

Middleton,

Wisconsin,

or

Esperanta Libro-Servo

2222 Crest Drive,

El Cajon, California.

KELKAJ GRAMATIKAJ HELPETOJ

pli kaj plu

Beginners sometimes mix up these words, which have very distinct meanings, although both normally translate as "more" in English.

Pli is a comparative: **pli honesta** means "more honest", **pli brava**—"braver", etc. Used by itself it often means "more" in the sense of amount: **Li kantas pli (multe) ol vi.**

Plu means "further", "in addition". **Ne parolu plu**—"Don't talk any more". **Ĉu ni iru plu?**—"Shall we go on?"

The difference is seen in a sentence like: **Vi manĝis tri porciojn da kuko, kaj mi ne povas manĝi pli**—"You ate three helpings of cake, and I can't eat more" (than you did); while . . . **kaj mi ne povas manĝi plu** would mean: ". . . and I can't eat any more" (because I'm full).

klaso and kurso

These are two more troublesome twins. **Kurso** is a course of instruction; **klaso** is a group of people. In American English we often use "class" in a broader sense: "I'm taking a class in sociology this term." In Esperanto, use **klaso** only when you mean the people who are taking the course: **Li estas en mia esperanta klaso**—"He's in my Esperanto class"; or a single meeting of the class: **Mi devas iri al mia Esperanta klaso**—"I have to go to my Esperanto class." But: **Post la komenca kurso okazos la daŭriga kurso**—"After the beginning course (or class) there will be a continuation course (class)."

iom, iomete, and sufiĉe

Don't use **iom** to mean "a little." **Iom** means an indefinite amount, neither great nor small. **Iomete** means "a little": **mi parolas germane iomete**—"I speak German a little."

Sufiĉe means "enough"; don't use it in the sense of "fairly" or "rather". **Li estas sufiĉe riĉa** means "He is rich enough" (not to need any more money, etc.).

Iom corresponds roughly to English "rather" or "fairly": **Li estas iom riĉa**—"He is fairly rich." Colloquially in America we sometimes use the word "quite" not in its literal meaning of "completely" but as almost any intermediate degree between "a little" and "completely". In Esperanto use for "quite" the appropriate word depending on the actual sense: **iomete, iom, sufiĉe, tute**, etc.

Ci tiun kontribuon al la serio de artikoloj por komencantoj verkas David Richardson. Se vi deziras kontribui al la serio, bonvolu sendi viajn ideojn al la redaktoro.

Donald Broadribb

IMPROVE YOUR VOCABULARY

Many Esperantists go through life with extraordinarily limited vocabularies. A good vocabulary is your best means of being able to express yourself. Here are some official Esperanto words that are often overlooked by students—

klapo, a hinge (and: **klappordo**, a trap door; **klapseĝo**, a folding chair).

bivaki, to camp. (Ignorance of this term is probably responsible for the appearance of the idioms "tendumi" and "kampadi" in recent years.)

pneŭmatiko, a tire (e.g. of a car).

vinkto, a rivet.

agronomio, agriculture.

rezultato, a result.

angoro, agony.

aplombo, self assurance.

arbusto, a bush.

honorario, a fee (e.g. as charged by a professional).

kabineto, a study room.

bankiero, a banker.

fono, background.

strebi, to strive.

benzino, gasoline. (**Benzinujo**, gas tank.)

LA MIRINDA AZENO

Iam en vilaĝo en Italujo loĝis maljuna vilaĝano. Lia nomo estis Alepo. Li estis kaj bonkora kaj naiva. Se vi serĉus tra la tuta lando mi dubas ĉu vi povus trovi viron pli trompeblan ol Alepo.

Nu, Alepo posedis azenon nomitan Pietro. Kia belega, inteligenta azeno! Ĝia felo estis blanka kiel lakto. Ne estis eĉ unu nigra au bruna haro sur ĝi. Alepo ne razis la felon de Pietro kiel aliaj viroj razas siajn. Ne, ne. Alepo estis tre fiera pri Pietro. Li permesis la blankan felon iĝi longa kaj dika. Alepo parolis al Pietro kiel al frato. Kaj Pietro, per ekspasmo de oreloj kaj per rulado de siaj brunaj okuloj respondis.

Alepo tiel amis Pietron ke li kore prizorgis lin. Anstataŭ rajdi sur Pietro, Alepo piediris apude, tenante la kolŝnuron per la mano.

Unu belan matenon Alepo decidis iri al la vendoplaco. Li volis vendi iom da fruktoj kaj iom da legomoj. Do, li plenigis du korbojn, metis ilin sur la dorson de Pietro, kaj komencis malsupreniri la monton. Kiel kutime, li piediris tenante la kolŝnuron per la mano.

Mezvoje sur la monto estis monak-ejo. Tien-ĉi venis knaboj por studi ĉe la pastroj. Ili ofte vidis Alepon kaj lian blankan azenon. Ili sciis kiel bonkora kaj naiva estas Alepo. Ĉi matenon kiam ili vidis lin, ili decidis lin trompi.

“Saluton, Sinjoro,” ili kriis laŭte, “Venu paroli kun ni.”

Tio plaĉis al Alepo. Li kondukis Pietron per la kolŝnuro al la grupo de studentoj kaj komencis rankonti al ili siajn plej amuzajn historiojn. Parolante, Alepo ekscitiĝis. Li faris multajn gestojn. Baldaŭ la kolŝnuro de Pietro falis nerimarkate al la tero.

Nun, du el la studentoj kaŝe rampis malantaŭ la azenon kaj tre kviete kondukis ĝin malantaŭ la konstruaĵon. Unu studento rapidege transigis la kolŝnuron al sia propra kolo, kaj la du korbojn al sia dorso, dum la alia

studento metis Piteron en la budon apudan.

Post kelkaj minutoj, kiam Alepo finis sian rakonton, li de la tero reprenis la kolŝnuron. Tiam li vidis alfiksite ne Pietron sed la junan studenton kun la korboj sur la dorso.

Alepo estis mirigata. Lia buŝo malfermiĝis, liaj okuloj rigardegis. “Patrin’ de Dio,” li ekkriis, “Kio estas?”

La petola studento turnis siajn brunajn okulojn samkiel Pietro turnis siajn, kaj respondis, “Alepo, bonkora mastro, kompatu min. Aŭskultu mian historion.

“Mi estis knabo maldiligenta kaj petola sentaĝulo. Ofte mia patro diris al mi, ‘Vi estas tro stulta por esti homo. Vi estas obstina kiel azeno.’ Unu tagon antaŭ kvar jaroj mia patro diris tion unufoje tro ofte, kaj azeno mi ja iĝis. Feliĉe, vi aĉetis min, Alepo. Vi tre bonkore prizorgis min. Ofte mi sentis ke vi scias ke homa animo loĝas en la korpo de via Pietro. Sed nun, post kvar jaroj, mia patro sendube preĝis al Dio redoni al mi mian homan formon. Vi vidis la miraklon, Alepo. Nun pardonu al mi la tutan ĝenon kiun mi kaŭzis al vi kaj permesu ke mi iru trovi mian patron.”

Nu, preskaŭ neniu ajn estus trompata per ĉi tiu ruzo, sed Alepo, estante kia li estas, kredis ĉiujn vortojn. Li gratulis la studenton pro la miraklo. Poste, prenante la kolŝnuron de sur lia kolo, kaj la korbon de sur lia dorso, Alepo diris al li iri libera kaj donis al la studento sian benon.

Dum la sekvintaj tagoj Alepo tre sentis la mankon de Pietro. Li ne kuragiĝis diri la veron al sia edzino aŭ al la najbaroj, do li donis aliajn kialojn.

La semajnoj forpasis, kaj venis la tempo de la ĉiujara foiro. Alepo kaj lia edzino decidis iri al la foiro. Alepo estas soleca sen Pietro. Ili komencis malsupreniri la monton.

Guste antaŭ la loko kie estas la foiro, Alepo kaj lia edzino vidis aron da ciganoj sub la arboj apud la vojo.

Unu ciganino kirlis' stufajon en fera potu super la fajro. Sed la plej interese vidajo estis azeno ligita al arbo. Azeno kun dika, blanka felo. Azeno tiel simila al la amata Pietro ke ĝi povus esti ĝemelo.

La koro de Alepo ekbatis rapide. Li rigardegis la azenon. Ĉu ĝi povus esti Pietro? Alepo kuris trans la kampon rekte al la azeno. "Pietro," li kriis. "Pietro."

La blanka azeno levis sian kapon. Gajaj oreloj ekspasmis, ĝiaj brunaj okuloj ruliĝis sciante. Alepo ĉirkaŭ-premis la vilan kolon. "Mia kompatinda knabo," li diris, "Ĉu via patro denove metis la malbenon sur vin? Ĉu vi denove estas ne homo sed azeno?" Kaj Pietro ekspasmigis siajn orelojn kaj rulis siajn brunajn okulojn.

La ciganoj, kiuj aĉetis Pietron de la studentoj, ne bone zorgis ĝin kaj Pietro estis feliĉa vidante sian antaŭan mastron.

Alepo mankaregis la kapon de la azeno. "Ne gravas," li diris, "Mi aĉetos vin de la ciganoj. Vi iros hejmen kun mi. Kaj eble, se vi estos bona azeno iam Dio denove estigos vin homa."

Alepo venigis Pietron hejmen. Ofte, dum la sekvintaj jaroj Alepo diris, "Vi estas bona azeno. Kial, do, vi ne iĝas homo?"


Kaj en la tuta lando ne estis alia azeno dorlotata kiel Pietro.

EN LA ADRESARO

En via ekzemplero de la ELNA-adresaro 1962, sur la unua paĝo, bonvolu noti la novajn adresojn por la sekvantaj Esperanto-kluboj (adresojn oni trovas sur la interno de la kovrilo de ĉi tiu gazeto): Missoula, Sacramento, Walla, Walla, Palo Alto, Portland, kaj Meadville.

VIAN MANUSKRIPTON

ne lasu en la ŝranko, sed proponu al la Revuo. Eble ĝi estos presata.



KLUBA VIVO

Gallup, New Mexico: La unuan fojon en la usona historio, okazis esperanto-ekspozicio en la biblioteko ĉi tie. La ekspozicio daŭris tri semajnojn en oktobro. Ĉi tie oni neniam antaŭe sciis pri Esperanto. Klopodo enkonduki kursojn en la biblioteko kaj urba kolegio fiaskis, pro manko de interesataj studentoj. Nia energia membro Roan Orloff Stone strebas por ŝanĝi tiun situacion. En la bildo: Roan Stone, ĉe la ekspozicio.

Sacramento: La Esperanto-societo kunvenas la duajn lundojn ĉe 1219 X St., kun proksimume 16 ĉeestantoj. Oficistoj por 1963: Julie Dunnell, prez.; Anne Marie Huff, vicprez.; Florence Curtis, sek.; John Q. Rickey, kas.

Meadville, Pa.: La 17an de oktobro oni fondis la Esperanto-Societon de Meadville. E. James Yuhasz (prononcu: ju-hos), prez.; Mabel Chapman, vicprez.; Carole Brent, kas.; Barbara Eberhardt, sek. 14 personoj konsistigis la fandan grupon. La societo kunvenas regule ĉiun unuan merkredan vesperon (krom en Julio-Septembro) en la YWCA.

Portland, Oregon: ESPO raportas ke, dum la septembra kunveno, membroj priskribis siajn somerveturojn; kaj aŭskultis sonbendon el Kanado. En okt.: oni diskutis la planon por Nordokcidenta kongreso.

Harvard Esperanto Club: aranĝis ekspozicion en la biblioteko de la Universitato Brandeis; prelegon ĉe la Kolegio Radcliffe; radiointervjuon kun Humphrey Tonkin per stacio WNAC, kvaronhoran.

URGENTLY NEEDED IMPORTANT INFORMATION

Please send information answering the following questions to the Secretary, if you have done anything in regard to promoting Esperanto in the past year, or know of anyone else who did:

1. How many articles did you have published, and in which periodicals? How many letters?

2. How many talks on Esperanto did you give? How many were in the audience? What were the groups addressed?

3. How many radio or TV talks did you make? How many displays or exhibits did you set up, how many posters were used, how many leaflets were distributed?

4. Did this activity result in increased interest in Esperanto?

5. Does any Esperanto group meet regularly or irregularly in your locality? Give details, if possible. Do you know of other Esperanto groups nearby?

This data is being collected for inclusion in the annual report of the Universala Esperanto - Asocio on world-wide Esperanto promotional activities.

Agado de diversaj membroj: **George E. Wagner** (Tampa, Florida) estis la temo de longa artikolo en la News de Parkersburg, W.V.; konataj radio-amatoroj inter niaj membroj estas **David Richardson**, **Eugene H. Royer** (WA6PSA), **Al Estling** (K7ETV), **Wilbur Harrison** (W7PES); **Ida Belle Craig** estis la temo de noto en la News de Sacramento, post reveno de la ELNAkongreso; **Donald Hoffman** gastigis la Baljetojn — kaj prelegis al la Lions Club en Newark, antaŭ 30 personoj, kaj en Belleville, antaŭ 25; membroj de la **harvarda Esperanto - klubo** inkludas **Stanley Cohen**, **Kenneth Hancock**, **Joseph Knowles**, **Richard Mather**, **David Murphy**, **David Newton**, **Jonathan Pool**, **Hugh Russell**, **Wissa Wissa**; **Catherine Schultze** instruas 3 vesperojn semajne salajrate en gimnazio, bazan kaj daŭrigan kursojn, kaj ankaŭ alian klason.

Pacific Northwest Esperanto Convention okazos dumsomere. Datoj ankoraŭ mankas, sed Esperantistoj en la nordokcidento estas petataj doni siajn opiniojn pri la projekto. La probbla loko estos Mt. Ranier National Park. Precipe Esperantistoj en Idaho, Oregon, Washington, kaj British Columbia skribu. Komuniku kun **Tom Davidson**, 3434 S.W. Marigold St., Portland 19, Oregon (Telefona: 244-5122).

Are you a subscriber to this magazine? If not, you may wish to receive it regularly, six times a year, keeping you informed of Esperanto and its movement. You may also wish to become a member of the Esperanto League for North America, thereby not only supporting the movement for Esperanto in America, but also entitling you to use the world-wide services of the Universala Esperanto-Asocio.



★ ★ ★
★ ★ ★

GRAVA ELDONAĴO DE „PHILIPS”

La grava kaj mondfama firmao Philips en Eindhoven, Nederlando, ĵus eldonis grandformatan, dudekpaĝan ilustritan katalogon pri siaj x-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj en Esperanto. Per ĝi la firmao esperas atingi la medicinan profesion de la tuta mondo.

Tiu ĉi iniciato de Philips montras ankoraŭfoje la kreskantan rekonon pri la utileco kaj grava rolo de la Internacia Lingvo en modernaj komercaj rilatoj.

LETTERS TO THE EDITOR

Letters to the Editor of local newspapers are among the most successful means of letting the general public know about Esperanto. The Review is publishing a series of especially effective letters which have been printed in local newspapers around the country, as examples of what can be done.

General principles for writing Letters to the Editor should be observed:

1. Always write an original letter, never a copy of someone else's.
2. Write to a newspaper which you read, and preferably one which is in your locality.
3. Be specific in what you say. Try to relate your comments to something printed recently in the newspaper to which you are writing.

To the Editor:

I read, with much interest, your article by Mr. Warren Groshong "Language Fight Starts," and I am not surprised.

Mr. Tormey, superintendent of San Mateo County Schools, is eminently correct in saying it lacks teachers, and he is also right in saying that the whole thing must be overhauled, if one language only is to be taught.

After all, there are 2,700 languages in the world, and we cannot teach them all. Must the many efficient teachers of Latin, French, German, etc., be discarded and the many persons who might want to study these languages forbidden?

Many of those languages may be unimportant, but who is to say which, and who is to know when the unimportant language may become very important, or dead. We once had a saying that "Latin is a dead language, dead as dead can be. Once it killed the Romans, and now it's killing me."

The logical, sensible thing is to adopt a world common language as a second language, in addition to our own. Fortunately, we already have such a language, very easily learned, already spoken in 82 lands. I pointed this out to the interim committee when it was considering this problem and asked to be heard when it came up for hearing, but was not notified and never learned of the law until after it was passed.

I was a member of the California Legislature for 20 years, until my voluntary retirement in 1950 and am author of a copyrighted textbook on Esperanto, the universal language, which may be found in many public libraries of U. S. and Canada (over 900).

We took a poll in this area of 183 grammar school graduates, asking them: "If you could choose among Esperanto, French, Latin and Spanish, with equal college credits, which would you choose?"

We received 30 replies. Ten chose Latin, 10 Esperanto, though many had never heard of Esperanto before, six Spanish and four French. But of course, a sixth grader can hardly choose his own best interest. That is a short cross section, but long enough to justify following up further.

The sensible thing is to refer this to the same or another interim committee to determine the best interests of the schools, the students and the taxpayers, and not be so hasty next time.

H. E. DILLINGER
P.O. Box 792
Placerville

Redwood City Tribune


Nov. 17, 1962

MALLONGAJ NOTOJ

Interesa broŝuro pri pesticidoj: la sekretario de ELNA ricevis interesan broŝuron en la angla lingvo titolitan "The Necessity, Value, and Safety of Pesticides." Membroj de ELNA kaj aliaj legantoj povas sin turni por ĝi al Louis A. McLean, sekretario, Velsocol Chemical Corporation, 330 East Grand Ave., Chicago 11, Illinois.

La Klubo en Meadville metis en sian konstitucion ke oni donos po 10c al ELNA ĉiujare.

Kosto de la UEA - aŝiso, kies bildo aperas sube, estas 6c por la malgranda kaj 12c por la granda.



Literaturaj Revuoj—informoj bona kaj malbona: la nova gazeto **Monda Kulturo** (de UEA) kostas \$4.50, kaj ĝian aperon ni aplaudas. Sed **Nica Literatura Revuo** baldaŭ malaperos; kaj la plej inda gazeto iam aperinta en Esperanto, **Norda Prismo**, suferas mortagonion pro manko de abonantoj. Ĉu ni neniam lernos konservi la bonon kiu fojfoje ektroviĝas inter ni?

Nova porjunula organizo, Junularo Esperantista Nordamerika (JEN), dissendis la trian numeron de mimeografata bulteno "Jen." Tute en Esperanto, la bulteno inkludas interesajn.

Por instigi eldonon de turisma folio pri Meadville, Pa. skribu ke vi ofte vidas mension pri la urbo en ia Revuo, kaj aliloke, kaj tial deziras turisman eldonon pri la urbo. Iel indiku ke via letero estas en Esperanto, kaj donu kiel adreson de tra dukonto de la letero: Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pa. Skribu al Meadville Chamber of Commerce, 898 Park Ave., Meadville, Pa.

EPI (Internacia Evangelia Radio- Stacio), Postfach 392, Bern 2, Svislando, eldonis sian EPI-Bultenon en Esperanto, kiun ĝi sendos al interesatoj.

De Charles Chomette estas ricevitaĵ \$10 kiel donaco al la Ligo memore al George Saville (mortinta antaŭ kelkaj monatoj).

Havindaj faldfolioj: kvar diversaj folioj pri Vieno, Vieno-Neustadt, kaj Aŭstrujo, mendeblaj de la Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Vieno 1, Aŭstrujo; kolora prospekto pri Hoor kaj Frostavallen, de Hoorbygdens Turisttrafikforening, fake 101, Hoor, Svedujo (sendu unu respondkuponon por pagi la sendkoston); pri la universitata urbo Lund, de Lunds Turisttrafikforening, Knut den Stores Gata 1 D, Lund, Svedujo (sendu unu respondkuponon por pagi la sendkoston).

Utilajoj: en la oktobra numero de British Esperantist estis reklamo por "Blazer badges" por Esperanto-klubo, de S. A. Cory & Co., 20 St. John's Hill, London, S.W.11; kaj la Skolta Esperantista Ligo (21 Brookfield Ave., Waterloo, Liverpool 22, Anglujo) vendas Universalajn Skoltajn Simbolojn, po 10 cendoj; "Esperanto Textbook of Phrases and Idioms" (mimeografita) estas vendata de Felix Woolf, 1 Shaftesbury, Piccadilly Walk, Sea Point, Cape Town, po 80 cendoj; Fluoreskaj aŝetoj por la fenestro de via aŭto, 3½ x 11½ coloj—teksto: Learn the International Language Esperanto—travel . . . correspondence . . . radio . . . literature . . . international conferences . . . commerce—eldonis SBET, vendas la sekretario de ELNA, kosto: po 15 cendoj, 2 por

25 cendoj, 5 por 50; sonbendo pri la 48a UK estas senpage havebla por Esperanto-Klubo, de la UEA.

The Modern Language Association publikigis utilan libron; "Reports of Surveys and Studies in the Teaching of Modern Foreign Languages." La kosto estas 4 dolaroj, sed multaj bibliotekoj ĝin havas.



S O F I O 3-10 VIII 1963

Glumarkoj okkoloraj pri la 48a Universala Kongreso de Esperanto estas eldonitaj de U.E.A. Prezoj: 1.8 steloj por unu folio da 10 markoj; 5 steloj por tri folioj; ĉe UEA aŭ ĉe Donald Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles 37 (13½ cendoj por 10).

LA STRANGAJ GEOGRAFIAJ NOMOJ DE USONO

(Tradukita kun permeso el artikolo en usona krucvorta gazeto, 10 Minutes Crossword, Novjorko.)

Ĉu vi, kiuj konas usonajn loknomojn, komprenas la sekvantan rakontajon:

"Ni ekiris el la Loko Kie Ni Ĉiuj Ebrüigis, kaj transiris la riveron al Tabaka Pipo, poste iris norden kaj okcidenten ĝis la Loko de Muŝoj. Ni eniris la ŝtaton de Fiŝkapejo, plu al la Loko de Mefitodoroj. Post iom da tempo ni atingis la marbordon ĉe la Urbo de Nia Sinjorino la Reĝino de la Anĝeloj de Porciunkla."

Jen estas la anglalingvaj nomoj de tiuj lokoj: Manhattan, Hoboken, Oswego, Michigan, Chicago, Los Angeles.

Duono de la usonaj ŝtatoj havas indianajn nomojn, kaj multege da urboj kaj lokoj. Iowa = la dormemulo; Oklahomo = la ruĝa popolo; Idaho =

gemo de la montoj; Dakoto = alligita; Tennessee = vinberujoj de la granda riverkurbo; Texas = amikoj; Kansas = zefiro apudtera.

Kelkaj ŝtatoj omaĝas al reĝintoj de aliaj landoj: Georgia: Reĝo Georgo de Britujo; Louisiana: La franca reĝo Ludoviko; Maryland: la reĝino Mario de Anglujo.

La senco de kelkaj loknomoj ne plaĉus iliajn enloĝantojn, se ili sciuis! Biloxi = malinda; Peoria = loko de dikaj bestoj; Katonah = malsanema.

Aliaj estas plaĉaj: Illinois = tribo de perfektaj homoj; Minnehaha = ridanta akvo; Mississippi = patro de akvoj; Ticonderoga = batalema akvo; Shenandoah = filino de ĉielo.


Estas multaj langotordaj nomoj: Sylacauga, Alabama; Skaneateles, New York; Conshohocken, kaj Punxsatawney, Pensilvanio; Nacogdoches, Texas; Tonganoxie, Kansas; Natchitoches, Louisiana; Mattapoissett, Massachusetts.

Interesaj loknomoj estas Greasy Ridge (Grasa Montareĝo), Boneyard Hollow (Ostareja Valet), Hogskin (Porkhaŭto), kaj Polka Dot (Punktoplana) en la ŝtato Ohio; Sleepy Eye (Dormema Okulo) en Minesoto; Frostproof (Nefrostigebla) en Florido; Wink (Palpebrumo) en Teksaso; Tombstone (Tombŝtono), Grasshopper (Lokusto), kaj Cinderpot (Cindropoto) en Arizono; kaj centoj da aliaj similaj.

Multaj urboj havas nomojn de Eŭropaj urboj, ekzemple: Manchester, Rome, Berlin, Moscow, k.c. Aliaj havas klasikajn nomojn: Sparta, Syracuse, Troy, kc. Multaj sudokcidentusonaj urboj havas hispanlingvaj nomojn religiajn: Corpus Christi, Sangre de Cristo, Santa Cruz, Santa Fe, Los Angeles, kc.

Kolombo opiniis, ke li atingis la orientan bordon de Hindujo kaj tial nomis la enloĝantojn "indianoj" (hispane: Indios).

Malgranda lago en Novanglujo (ekstremorienta Usono) ricevis la nomon Lake Chargogagogmanchaug-goggagungamaugg!!



DE LA SEKRETARIO

Inter personoj kiuj kontribuis uzitajn poŝtmarkojn sendotajn al Danlando (kie oni ilin vendos, kaj per la mono ricevita subtenos la diskonigon de Esperanto en novaj regionoj) estas: la familio Doneis, Stanley Otto, Catherine Thompson, familio Jahger, Esperanto-Societo de San Francisco, Napa Esperanto-Klubo, kaj ankaŭ s-anoj Epstein (Brooklyn), Kovacs, Worrell, Dayton, Winnick, Mary Gibson, B. Engel, Toni Somon, de Groot, Marble, Sabin, Kennelty, Berry, Chobanoff, Ayres, Liberman.

Nove establita legcentro en la Filipinaj Insuloj petis malnovajn librojn kaj gazetojn en la angla, hispana, kaj esperanta lingvoj. Sendu ilin al Felipe J. Jimiera, Tungao Logging Camp, Butuan City, Agusan, Mindanao, Filipinaj Ins.

"Vi skribis pri regiona multobligita "Tri - Stata Esperanto - Revuo" kaj ni deziras ricevi ĉiujn ĝis nun eldonitajn numerojn kaj de nun regule post la apero, por nia biblioteko. Bonvolu afable aranĝi tion. La Adresaron de ELNA ni kun danko ricevis kaj envicigis en nian katalogon. Dankon pro la artikolo pri la muzeo, kiu tre bone plaĉis. Ni tre ĝojus, se kelkaj Usonanoj fariĝus abonantoj. Bonvolu transdoni miajn salutojn al la kungebatalantoj en via lando kaj akceptu koran saluton," skribis Hugo Steiner, Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I, Aŭstrujo. Sendube ĉiuj, kiuj eldonas ion pri Esperanto, volas kontribui al la fama kolekto, sendante tion al li.

Gazetoj ricevitaj: Nica Literatura Revuo, no. 39; Dia Regno, no. 9, 10; Esperanto en Skotlando, no. 47; Germana Esperanto-Revuo, no. 9; Informilo de IEMW, no. 47; Dansk Esperanto-Blad no. 8, 9; Australian Esperantist, no. 28; Bulteno de Esperanto-Klubo en Praha, no. 62; De Esperantist, no. 3; Instituto Teozofia

"Uruguay" no. 5; Boletín Uruguayo de Esperanto, no. 37, 38, 39; Jugoslaviana Esperantisto, no. 5, 6; Sennaciulo, no. 8-9, 10; British Esperantist, no. 682, 683; Espero Katolika, no. 528; La Gusta Vojo, aŭg-sept. 1962; Heroldo de Esperanto, no. 1345; New World Review, Okt. 1962 (Bernard Koten respondis al demando pri la historio de la Esperantomovado en USSR); New Zealand Esperantist, no. 244-5; Nia Voĉeto, no. 2; Norvega Esperantisto, no. 7; Oomoto, julio-aŭg. 1962; Paco, aŭg. 1962; El Popola Ĉinio, no. 4; Revue Française d'Espéranto, no. 211; La Revuo Orienta, sept. 1962; SAT-Amikaro, aŭg-sept. 1962; Sonorilo, no. 5.

La Societo de Britaj Esperantistaj Instruantoj (SBET) sendis al la sekretario specimenojn de ĉi tiuj eldonaĵoj uzataj en ĝia laborado: 1) 1st Year Esperanto for Juniors (ĉiutagaj lecionoj 20, 15, aŭ 10-minutaj por 7-jaruloj). 2) sim., sed 6 monata kurso, kun 2-semajnaj lecionoj po 30 minutoj, por 8-11-jaruloj. 3) Unuaj Ekzamenoj por Lernejoj, ĝeneralaj informoj. 4) Lerneja Korespondado en Esp. 5) Graĵnoj en Vento. 6) Korespondado kaj Legolibroj por Infanoj, de Graĵnoj en Vento. 7) Kordinitaj Esp-Kursoj (multlandaj). 8) Librolisto por Lernejoj. 9) Modernaj Lingvoj—kun speciala atento al la int. lingvo Esp.—en la edukado de studentoj kun meza aŭ submeza kapablo. 10) Urbo Stoke-on-Trent—Eduk-Komitataj Kursoj pri Esp. 11) Klariga folio pri la SBET. 12) Konstitucio de SBET. 13) Represajoj de: a. La Eduka Valoro de Esp. b. Esp. kaj Infanoj en la Familio. c. Dua Lingvo por la Moderna Supera Lernejo. d. Artefarita sed Vivanta. e. Raporto de Denton Egerton Park Country School Report on the Teaching of Esp. de 1948-1960. f. Utilaj informoj por personoj instruantaj Esp. (Grandparte en la angla lingvo.)

De la redaktoro:

CHU ESPERANTO SUKCESOS?

Jus forpasis la sepdek-kvinjara jubileo de la Esperanto-movado, kaj nun estas bona oportuno por rigardi nin, kaj por agnoski kaj niajn fortojn kaj niajn malfortojn.

Unue, la pozitiva flanko: laŭ pluraj vidpunktoj, Esperanto estas nekredebla sukceso. Ĝi firme radikiĝis kaj nun kreskas fortike. Ĝi havas tradiciojn, ĝi havas estimindan literaturon, ĝi preskaŭ havas propran mondon—monsistemon ĝi havas, gazetojn ĝi havas, konferencojn ĝi havas, eĉ infanojn ĝi havas. Nukleo de vere kompetentaj parolantoj firme ĝin kuntenas. Tiu nukleo estas malgranda (eble nur dek aŭ dekkvin mil), sed reala.

Due, la negativa flanko: laŭ pluraj vidpunktoj, la sukceso de Esperanto restas nur idealo. La multiĝo de seriozaj studentoj estas nur tre malgranda, malmulte pli granda ol la perdo (pro morto kc.) de la kompetentuloj. Sekve, la movado tre malrapide kreskas. Inter ni estas multaj entuziasmuloj, kaj ĉiu kurso inkludas personojn kies fervoro hontigas nin. Sed la plej granda parto de la entuziasmuloj iom post iom foriras, kaj nur kelkaj el la restuloj efektive lernas la lingvon serioze. La prezidanto de unu forta klubo, kiun mi konas, neniam lernis la futuron. "Mi iris morgaŭ," li diras. En almenaŭ nia lando, la nomo de la projekto Interlingua estas pli konata ol la nomo de la vera lingvo Esperanto.

Mi volas ĉi tie nur sugesti por pripensado unu konkretan ideon por venki la negativajn aspektojn de la movado. Ĝi estas tio: inter la Esperantistoj mem Esperanto havas grandan valoron, kaj la uzanto trovas multan utilon. Sed la movado estas tre "ingrown," por uzi anglan esprimon. Ĝi bezonas renkonti la ĝeneralan publikon, ne kiel varbanto varbatojn, sed kiel kultura movado mondon por kiu ĝi utilas. Mi volas memorigi al ni pri unu el la grandaj valoroj de Esperanto kiujn antaŭ-

vidis Zamenhof, sed kiun ni grandparte malatentis. Ke Esperanto povas utili al la neesperantista mondo.

Unue, la internacia karaktero de Esperanto, kaj ĝia lingva strukturo, faras ĝin preskaŭ modela traduklingvo. Se entrepreno ekzistus, kiu almenaŭ por kelkaj fakoj proponus al la publiko fari (kontraŭ pago) tradukojn de teknikaj libroj kaj artikoloj, tiu servo mem estus granda varbilo por la lingvo. Mi pensas pri io tia: anglalingvano bezonanta tradukon de germanlingva artikolo povus sin turni al la entrepreno. La entrepreno provizus al li (kontraŭ pago) tradukon. La traduko estus en du paralelaj kolonoj—unu estus la traduko el la germana en Esperanton; la dua estus la traduko el Esperanto en la anglan.

Due, la internacia disvastigiteco de Esperanto faras el ĝi modelan lingvon por turismaj celoj. Sed neniu turista entrepreno ĝin utiligas. Denove, komerca utiligo de Esperanto, fare de entrepreno kiu organizus turismajn helpojn, estus servo por la mondo, kaj samtempe varbo. Turista servo, kiu utiligante Esperanton gvidus naciolingvanojn estas tute efektivegebla afero.

Trie, la fakto ke Esperanto estas tirita el la naciaj lingvoj donas al ĝiaj vortoj kompreneblecon por neesperantistoj. Fojfoje oni utiligis tiun fakton, iom heziteme, inkludante esperantan tradukon de vortoj en tabeloj, en telefoninstrukcioj, kc. Aktuale multaj libroj aperas plurlingve. Inkludo de Esperanto inter la lingvoj en plurlingva teknika vortaro, instrukcio, kc. estas ebla. Sed oni devas ne supozi ke la mondo mem aklande postulos tion. Kiam oni scias ke tia libro estas preparata, kontakto kun la eldonistoj kun sugesto pri Esperanto kaj **ankaŭ** kun preteco pagi la kostojn ekstrejn por enmeti Esperanton povas efiki.

Ni volas Esperanton. Ni komprenas, ke Esperanto estas grava akiro por la monda kulturo. Sed la mondo mem ĝenerale ne vidas en Esperanto praktikan valoron. Se tiun problemon ni venkos, grava barilo malaperos.

DONACOJ AL LA REVUO

Post la listo en la kongresa numero, estas ricevataj:

de la Familio D. Parrish	\$10
Ida Wenstrom	10
Josephine Freeman	10
Joseph R. Scherer	10
Ted. Stewart	20
Joseph Gamble	10
Familio S. W. Glassen	5
Edmund Bartsch	5
Familio Edward Kalmar	3

LA PLEJ EFIKA INFORMADO

Ĉiu esperantista grupo cerbumadas pri la plej efika maniero informi la publikon pri Esperanto. Multaj metodoj estas praktikataj, kaj rekomendindaj. Sed senkosta, ĉiam funkcia, reklamo kaj informo estas disponebla en ĉiu urbo.

Kie via redaktoro loĝas, preskaŭ ĉiu magazeno kaj ĉiu libro- kaj gazet-butiko stokas la du popularajn libro-seriojn, la Teach Yourself serio kaj la Say It serio (la unua, de brita eldonejo; la dua, de la usona Dover). Elstaraj en ambaŭ serioj estas bone verkita Esperantolibroj: Say it in Esperanto, kaj Teach Yourself Esperanto. En dekoj da butikoj, do, la publiko renkontas ne nur la vorton Esperanto, sed ankaŭ solidajn librojn pri ĝi. Ĉu en via urbo la butikoj stokas tiujn seriojn? Se ne, ĉu simpla mencio al la butikestro ke bona veno estas la "Teach Yourself" aŭ la "Say It" serio ne meritus la penon? Speciale butikoj proksimaj al kolegio aŭ universitato estas bonaj por tio.

En urboj kie kelkaj dekoj da esperantistoj ekzistas (ĉu aŭ ne aktivaj) alia ago helpus kaj por informadi la publikon, kaj por helpi la esperantistojn mem. Preskaŭ ĉiu urbo havas almenaŭ unu butikon kiu speciale stokas fremdlingvajn librojn. Peto al la butikestro, ke kelkaj libroj en Esperanto stokiĝu, povus esti bonrezulta. Tiel, ne nur la publiko denove vidus la nomon Esperanto,

sed vi mem profitus, ĉar vi havus butikon, kie vi povus rigardi kaj aĉeti esperantajn librojn. Sed unu averton: unu librotikisto atentigis nin, ke la esperantaj eldonistoj nur malvolonte traktas kun privataj librotikoj, kaj li malfacile sukcesas ricevi de ili librojn por vendo. Do vi povus doni kiel nomon de librodistribuisto la adreson de la ELNA-libroservo.



„Ne rigardu nun, Georgo . . . sed ĉu vi estas certa, ke ni sidas en aviadilo Londono-Stokholmo?” (Travel World)

Heroldo de Esperanto

ESPERANTO GROUPS IN THE UNITED STATES

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information.

California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto Club (Catherine Schulze, 410 Darrell Road).

Los Angeles: L.A. Esp. Club, 1406 N. Sycamore Ave., Hollywood.

Napa: Napa Esperanto Club (Martha Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (Box 11564, Station A, Palo Alto).

Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (Florence Curtis, 5101 Stockton Blvd., Sacramento 20).

San Diego: Esp. Soc., P.O. Box 6215, San Diego 6.

San Gabriel Valley, Blind Study Group of (Mrs. Phillips Neuman, president, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: Blanche Parker, 515 25th Street, Santa Monica.

Illinois:

Chicago: The Esperanto Club of Chicago (Julie Regal, 310 4th Avenue, Downers Grove).

Massachusetts:

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street).

Harvard Esperanto Club, Quincy House, Box 8, Cambridge 38.

Michigan:

Ann Arbor: Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale, Ann Arbor.

Montana:

Missoula: Esp. Study Group (Bob Davis, 1721 Helena, Missoula).

New York:

The Esp. Society of Greater New York, 50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.

Esperanto-Klubo de Novjorkurbo, 340 Riverside Drive, New York 25, N.Y. (Julius Balbin, Penthouse 2).

Junularo Esperantista de Nord-ameriko (JEN), ĉe Richard P. Kollin, 30 Avenue B, Apt. 4A, New York 9.

Oregon:

Canby: Mrs. Wallace Peterson, Route 2, Box 120.

Hillsboro: Adrian Hughes, 476 S. Bailey Avenue.

Portland: ESPO (Evelyn Deer, 12946 N. E. Hancock St., Portland 30).

Pennsylvania:

Allentown-Bethlehem: Esp. Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Esperanto Society of Meadville (Barbara Eberhardt, 681 Hickory St., Meadville).

Pittsburgh: Esp. Club of Pittsburgh (L. A. Spriggs, P.O. Box 8302, Pittsburgh 18).

Triŝtata Esperanto-Komitato (W.Pa., E. Ohio, N.W.Va), Frans J. Jahger, 2736 Locust Drive, Bridgeville, Pa.

Washington:

Seattle: Vincent Griffeth, 8556 37th Avenue, S.W.

Spokane: H. K. VerPloeg, 1908 E. 8th Avenue.

Tacoma: Ruth Culbert, 1912 N. Monroe.

Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St., Walla Walla).

Se la supraj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu sciigi:

DOROTHY HOLLAND, Estrino,

EI.NA Membreca kaj Organiza

Komitato,

1701 Rockwood Trail,
Fayetteville, Arkansas.

**BY AIR MAIL
PER AERPOSTO
PAR AVION**

ESPERANTO, INTERNACIA LINGVO

NEW AIRMAIL STICKERS

For a big supply of 250, send \$1 to:

Esperanto League Esperanto Press
808 Stewart St. or Oakville, Ont.
Meadville, Pa. Canada

HEROLDO

DE ESPERANTO

**DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO**

\$4.00

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

ESPERANTO YOUR PASSPORT TO WORLD FRIENDSHIP

Reprints of the popular Special Educational issue of the Review. Extremely useful for publicity work. Keep a supply on hand.

New Price:

Per copy: 25 cents postpaid.
Five copies: \$1.00 postpaid.

Order from:

Thomas A. Goldman
7008 Millwood Rd.
Bethesda 14, Maryland

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA

invites you to consider membership in the League. As a member of the League, you receive the **Esperanto Review** regularly through the mail, support the movement for making Esperanto known to the American public, are entitled to the services of the League, and are also an affiliated member of the *Universala Esperanto-Asocio*, entitled to the services of the network of 3,000 local consuls and other world-wide Esperanto services. The coupon below may be of convenience in applying for membership:

APPLICATION BLANK

Esperanto League for North America

808 Stewart St., Meadville, Pa.

I am enclosing a check/money order for \$..... in payment of the following (check which):

..... year subscription to the **North American Esperanto Review**, \$3.00.

..... year membership in the Esperanto League for North America, including subscription to the **North American Esperanto Review** and associate membership in the U.E.A., \$5.00.

Name:.....

Address:.....

ESPERANTO PRESS

Oakville, Ontario, Canada.

Return and Forwarding

Postage Guaranteed.